

# Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo 2018

21 februaro 2018

Okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, starigita de UNESKO por memori pri la riĉeco de lingva diverseco tra la mondo, Universala Esperanto-Asocio atentigas, ke, dum en iuj landoj oni atentigas pri konservado de lingva diverseco kaj utiligo de gepatraj lingvoj en la instruado, en aliaj landoj la diskriminacio kontraŭ parolantoj, kies gepatra lingvo estas malgranda kaj ne rekonata, ankoraŭ ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la mondo.

Rezulte, multaj infanoj estas senigitaj de la ebleco lerni en la propra lingvo, eĉ je elementa nivelo, kaj sekve suferas malavantaĝojn en siaj unuaj klerigaj jaroj.

Tiel okazas iom post iom la malapero kaj morto de lingvoj, kaj tutaj popoloj perdas sian intelektan riĉecon – kiel atentigas multaj lingvistoj ankaŭ en la kadro de iniciatoj de UNESKO.

La biologia kaj lingva diversecoj estas nedisigeblaj, interkonektitaj kaj dependantaj unu de la alia. El perdo de lingva diverseco rezultas perdo de tradiciaj konoj esence necesaj por daŭripova biodiverseco, por la vivo.

Parolantoj de la internacia lingvo Esperanto favoras la egalecon inter ĉiuj lingvoj kaj ĉiuj kulturoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj. Jam de la 1950aj jaroj nia Asocio kunlaboras kun UNESKO por protekti lokajn lingvojn kaj ilian uzadon en edukado. De kiam UNESKO starigis la Tagon de la Internacia Gepatra Lingvo en 1999 Universala Esperanto-Asocio ĉiam partoprenas la agadojn per propraj aranĝoj (afiŝoj, deklaroj, kunvenoj) kaj ankaŭ en ĉi tiu jaro per materialo en pluraj lingvoj (<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2018/>).

La kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la diverseco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj, kiujn la tutmonda movado por Esperanto defendas. Ni, la parolantoj de Esperanto, volas neniun lingvon malaperigi; ni volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj ke regu lingva justeco en la interkomunikado.

Esperanto estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdís Finnbogadóttir, eksa prezidento de la Respubliko Islando: “Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo.”

Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj interesoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas bonvolaj homoj el plej diversaj popoloj, nacioj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en spirito de paco.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations  
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.  
212-687-7041